## Logika enigmo pri infana kongreseto

| nomo | petĉjo | linjo | pavlo | karinjo | miĉjo |
|---|---|---|---|---|---|
| ĉemizo | | | | | |
| aĝo | | | | | |
| lando | | | | | |
| sporto | | | | | |
| hobio | | | | | |

1. Peĉjo kun la blanka ĉemizo havas dektri jarojn.
2. Linjo kun blua ĉemizo ŝatas muzikon.
3. La germano kolektas poŝtmarkojn.
4. La hungarino portas verdan ĉemizon.
5. La futbalisto estas filmamatoro.
6. La naŭjarulo portas ruĝan ĉemizon.
7. Karinjo estas gimnastino kaj volonte vizitas teatron.
8. Unu el la geknaboj venas el Italio.
9. Unu portas flavan ĉemizon.
10. Unu estas dekdu-aĝa.
11. Miĉjo ludas tenison kej venas el Hispanio.
12. La sprintulino havas dekunu jarojn.
13. Pavlo el Bulgario jam festis sian dekkvaran naskiĝtagon.

***Kiu estas boksisto?*** ***Kiu ŝatas enigmojn ?***

*Solvo de la septembra enigmo:*

1 – 13 septembro 2 – 14 pratempo 3 – 15 terpomo 4 – 16 kompoto
5 – 17 siesto 6 – 18 ŝipestro 7 – 19 hejmtasko 8 – 20 fantasto
9 – 21 komodo 10 – 22 humoro 11 – 23 kanono 12 – 24 tenoro


***Tempo estas mono.***

**Konontaktu nin!** **Gun.Eb@t-online.de** **+49 3831 490003**

# Stralsundaj frekvencoj

**Per Esperanto por popolkompreniĝo**

jaro 2005 novembro




Eltrovita en kalendaro.

# Invito

La S.E.E.-hotelo en Negast apud la Hanseurbo Straldund

**denove invitas**
**al turisma Esperanto-aŭtuno**
**de la 12a ĝis 16a de septembro 2006.**

Ĝi ofertas komfortajn du- kaj unulitajn ĉambrojn (ekstra lito por infanoj eblas). La prizorgo de la gastoj pere de la Stralsunda Esperanto-grupo estas garantiata.

Kompreneble ankaŭ eblas resti nur parte de la tempo kaj laŭ deziro plilongigi la restadon. Esperanto estas rimedo por la komunikado, ne kondiĉo, do ankaŭ ne la lingvon regantaj familianoj estas bonvenaj.

Ĝis nun estas reservitaj 10 dulitaj ĉambroj, sed nur ĝis la 30a de majo 2006. Poste estas hazardo, se vi ankoraŭ trovos lokon.

En la programo ni planas ekskursojn al la insuloj Rügen, Hiddensee aŭ Usedom, al la urboj Stralsund kaj Greifswald; naĝadon en la hotela baseno, keglovesperon kaj viziton de iu ajn kultura aranĝo en Stralsund.

Kotizoj: Vi surloke pagos, kio estas bezonata dum la renkontiĝo (hotelo, vojanĝ- kaj enirbiletoj, manĝo ktp.) La oficialaj litoprezoj estas 38,50€ en dulita kaj 54€ en unulita ĉambro inklude de matenmanĝo.  Se estos okupitaj ĉiuj 10 ĉambroj eblas rabato.

Informoj kaj aliĝoj eblas telefone, rete aŭ letere al Gunter Ebert (Vidu sur la lasta paĝo!)

## *Diversaj aferoj*

**Jara kunveno de la Kulturligo.** Je sabato, la 22. 10. 2005 okazis en Neustrelitz la jarkunveno de la Kulturligo Meklen-burgio-Antaŭpomerio. Ĉeestis la federacia presidantino de Kulturligo, s-ino Barbara Kellerbauer. Flanke de la esperantistaro partoprenis Wally Baumann el Schwerin kaj Gunter Ebert el Stralsund.

Post modesta programo omaĝe al la 200a mortotago de Friedrich Schiller la 32 partoprenantoj elektis novan estraron de la landa asocio. Sed komence oni honore akceptis la demision de la ĝisnuna presidanto profesoro Benno Pubanz. Multnombre oni laŭdis lian sindonan laboron ekde la politika ŝanĝo en nia lando. Li vere savis la asocion  de la neniigo kaj substrekis, ke la Kulturligo estas la ununura asocio, en kiu oni laboras por trovi samideanojn kaj ne strebas al iu ajn alta posteno.

La baloto de la nova estraro mem okazis unuvoĉe kaj surprize oni elektis esperantiston (Gunter Ebert) en la baloto-komision.

**Surprizo en Neubrandenburg** Dum la lasta semajnfina semi-nario en Neubrandenburg mi travivis surprizon kaj povas diri, ke la mondo vere estas vilaĝo. Partoprenis el Svedio nia amiko Hans Häglund. Je la reciproca prezentado li menciis, ke li lernis de E-on de ŝatata instruisto, kiu ekde jardekoj ne plu ŝatas trinki kafon. Je mia demando, ĉu temas pri Manfred Stenberg, mian longjaran amikon, li jesis kaj mem ankaŭ estis surprizita, ke mi konas tiun. Jes, lastfoje mi estis kune kun Manfred dum la UK en Vilno. Ni eĉ uzis komunan ĉambron.

**Nia venonta kunveno** La venonta kunveno de la antaŭpome-ria E-grupo Stralsund okazos je merkredo, la 11. 01. 2006, 14:30h, en la kafejo Strandt en la Mönchstraße, vidalvide de la eniro al la marmuzeo.